

STARTO

N-ro 3/2009 (232)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



foto: Bohumil Řepa

La unua etapo en Lančov 2009

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-
Asocio, p/a Pavel Polnický, Na Vinici
110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615
651, cea@esperanto.cz

Identec-numero (IĈ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu
linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč
por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo.
Duobla reklamo 15% rabato, trifoja
reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj
duonpreze.

Membrokotizoj: A 300 Kč, B 200
Kč, C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola,
enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: 600 Kč ko-
mencantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj:
Jana Melichárková, Polní 938, 696 02
Ratíškovice, melicharkova8@seznam.
cz

Libroservo: p/a Anna a Jiří
Vyšinkovi, Kollárova 131, 696 42
Vracov, tel. 518 628 155,
anjivy@seznam.cz

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana,
blindula, medicina, fervojista, pri
informadiko

Komisiono de ĈEA: pedagogia

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:
Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538,
738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova
@centrum.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

195 230 825 / 0300

Poštovní spořitelna Poděbrady

Komitato de ĈEA:

Prezidantino: Jana Melichárková, Polní
938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova8@
seznam.cz (reprezentado de ĈEA, kun-
ordigado, internaj asociaj rilatoj, metodiko)

Vicprezidanto (komitatano A de UEA):
Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobří-
chovice, tel. 257 712 201, fakso 257 712
126 chrdle@kava-pech.cz (internaciaj
rilatoj, fakaj aplikoj de Esperanto, ĈEA-
retkomunikoj, eldona agado)

Vicprezidanto: Jiří Tomeček, Dr. Bureše
3, 370 05 České Budějovice, tel. 602 611
584, Tomecek@esperanto.cz (muzeo,
konferencoj, TTT, ekster-asociaj rilatoj)

Sekretario: Pavel Polnický, Na Vinici
110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615
651, cea.polnický@quick.cz (protokolado,
korespondado, rilatoj kun la banko)

Kasistino: Libuše Hýblová, Bohutín 136,
789 62 Olšany, libusehyblova@seznam.cz,
774 928 974 (membrobazo, kontado)

Komitatanino: Pavla Dvořáková, Grego-
rova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424,
pavladvorakova@tiscali.cz (kluboj, projek-
toj)

Komitatano kaj redaktoro de Starto:
Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625
00 Brno, tel. 547 240 690, malovec
@volny.cz (sekcioj, komisionoj)

**Ĉefdelegitino de UEA por Ĉeĥio kaj UK-
perantino:** Lucie Karešová, Havlíčkovo
nám. č. 1, 130 00 Praha 3, tel. 603 444 828,
Lucie.Karesova@seznam.cz

Kontrolgrupo de ĈEA:

Prezidantino: Libuše Dvořáková, Zahradní
2/B, 568 02 Svitavy, tel. 461 532 257,
dvor.libuse@seznam.cz

Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04
Drnovice, 517 385 367, hirs@gm.vyskov.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 00
Pardubice, Ludmila.Srbova@seznam.cz

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer
domo, Máchova alej 1, 568 02 Svitavy,
direktorino: Blanka Cuhelová, tel. 461 532
704, cuhelova@muzeum.svitavy.cz.

Kontrollegis: Sabine Hauge, Pavel Polnic-
ký kaj Vatislav Hirš.

REZOLUCIO DE LA 94-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La 94-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Bjalistoko de 25-a de julio ĝis 1-a de aŭgusto 2009, kun partopreno de preskaŭ 2000 homoj el 63 landoj en la jaro de la 150-a datreveno de la naskiĝo de la kreinto de Esperanto, Lazar Ludwik Zamenhof, kaj samtempe en la Internacia Jaro de Akordiĝo proklamita de Unuiĝintaj Nacioj,

diskutinte la kongresan temon "Krei pacan ponton inter la popoloj: Zamenhof hodiaŭ", kaj studinte kun aparta atento la vivon kaj verkojn de Zamenhof,

notinte la fakton, ke la urbo kaj regiono de Bjalistoko pli kaj pli rekonas la escepte gravan rolon, kiun Zamenhof ludis kaj daŭre ludas kiel monde rekonata figuro en la morala evoluo de la homaro,

konsciante, ke tiu rekono konkretiĝis interalie en la malfermo de Centro Zamenhof fare de la urbaj aŭtoritatoj de Bjalistoko, kaj en propono, ke la Bjalistoka Universitato ricevu la nomon Zamenhof;

memorigante, ke okaze de la 100-a datreveno de la naskiĝo de Lazar Ludwik Zamenhof Unesko rekonis lin kiel unu el la grandaj personecoj de la mondo, kaj ke tra la jaroj venis multaj similaj rekonoj pri la meritoj de Zamenhof kiel granda monda pensulo,

kaj gratulante Unuiĝintajn Naciojn

pro ĝiaj iniciatoj rilate al la ideo de akordiĝo, tiel esenca en mondo kiun dividas malakordoj pro antaŭjuĝoj kaj manko de toleremo,

konstatas, ke

1. Per la internacia lingvo Esperanto, Zamenhof kreis unike efikan ilon de internacia komunikado sur neŭtrala bazo, sen favori unu popolon super alia, kaj sen favori unu etnan lingvon super alia, kaj ke tra pli ol 120 jaroj da uzado Esperanto pruvis sian taŭgecon kiel internacia lingvo plene adaptebla kaj adaptita al ĉiuj komunikaj bezonoj.

2. Tamen, Zamenhof samtempe komprenis, ke lingvo estas kolektiva posedaĵo, kaj konfidis la evoluon de sia lingvo al ties komunumo de uzantoj, tiel ke Esperanto kaj ĝia kulturo fariĝis esence kreaĵo kolektiva, kiu evoluis en spirito de lingva demokrateco.

3. Tion farante, Zamenhof ankaŭ rekonis, ke utiligo de neŭtrala lingvo en la internaciaj rilatoj helpus konservi lokajn kaj regionajn lingvojn kaj kulturojn kaj la identecon de ties komunumoj.

4. Zamenhof ankaŭ signifis kontribuis, per siaj verkoj kaj agoj, al klopodoj forigi la malamikecon inter la anoj de la diversaj religioj, al forigo de rasaj antaŭjuĝoj, kaj al rifuzo de milito kiel akceptebla maniero solvi disputojn – valoroj same gravaj en la nuna epoko kiel en la epoko de Zamenhof.

5. Sekve, Zamenhof plene meritas pli da atento ne nur kiel kreinto de lingvo sed kiel persono, kiu strebis al aŭtenta frateco inter la homoj surbaze de plena kaj reciproka kompreniĝo.

6. Tia frateco povas veni nur kiam la homoj interkompreniĝas en recipoka respekto – procedo, en kiu Esperanto povas ludi kaj jam ludas unikan rolon.

7. Interkompreniĝo estas esenca paŝo al tiu profunda kaj daŭra akordiĝo, kiu estas la celata idealo de la Internacia Jaro de Akordiĝo.

8. Akordiĝo eblas nur en situacio, en kiu lingvaj diferencoj ne formas baron al egaleca dialogo.

9. En tiu senco Esperanto estas unike taŭga kiel bazo por daŭra akordiĝo, kaj Universala Esperanto-Asocio, per sia atento ankaŭ al moralaj valoroj kaj al respekto de homaj rajtoj, povas signife roli en plenumo de la celoj de la Internacia Jaro de Akordiĝo.

Zamenhofa jaro

Ĉi-jare la 15-an de decembro pasos 150 jaroj de la naskiĝo de Zamenhof, tial la 94-a kongreso okazis en lia naskiĝurbo Bjalistoko kaj estis tie inaŭgurita nova Centro Zamenhof.

La urbo jam longan tempon antaŭe preparis sin por festi sian plej mond-faman civitanon.

En granda blanka tendo inaŭguris la kongreson Probal Daŝgupta, kiu inter la gastoj prezentis eksan marŝalon de Pola Sejmo Roman Mallinowski, eksan ĉefministron de Pollando Włodzimierz Cimoszewicz, vicurbestron Aleksander Sosna, reprezentanton de pola ministerio por turismo kaj sporto k.a. La mesaĝo de alta protektanto Sejmmarŝalo Bronisław Komorowski estis legita.

D-ro Louis C. Zaleski-Zamenhof, la nepo de la Majstro, ne nur salutis la kongreson, sed tralegis leteron ankaŭ de sia filino vivanta en Usono. Aperis salutoj de aliaj membroj de Zamenhof-familio kaj ankaŭ de Grabowski-familio.

Prof. Tonkin enkondukis la kongresan temon *Krei pacan ponton inter la popoloj: Zamenhof hodiaŭ*, poste salutis reprezentantoj de diversaj movadaj asocioj, inter ili ankaŭ Marek Blahuš.

Poste sekvis semajno kun ĉ. 240 programoj: kunvenoj de fakaj asocioj, de Akademio, nova filmo *Doktoro Zamenhof*, koncertoj, baloj, teatro (*Domo sur la landlimo, Bjalistoka babelturo, Ludoviko-Lazaro*), prelegoj (*Novaj teĥnologioj kaj Esperanto*,



Feliĉan datrevenon, Ludoviko!

En 1879, okazis antaŭ 130 jaroj, ke unu homa spirito, tamen loĝanta en la granda urbo de Bjalistok, naskiĝis, naskiĝis, naskiĝis... Ĉi tiu naskiĝo idon kiu ankoraŭ ne estas superita, idon kiu ankoraŭ ankore atingis sian plej altan punkton de grandeco, naskiĝis popolo kiu sur la viraĵo, fidele, de ĉiuj diferencoj, unu de la jaroj, tra la tuta mondo kaj kio en la spektaklo de ĉiuj loĝantoj de la mondo tenas unu de si kaj plej bonaj idon kaj bonon.



Tamen, antaŭ 130 jaroj, de ĉi tiu en Bjalistoko naskiĝis la Ludoviko Lazaro Zamenhof, fondinto de nia mondo, fondinto de nia popolo, la nia nio popolo kio loĝanta sur la 94-a kongreso por la jaro de la nio homa la idon de si, de la Majstro.



Saluto de la Prezidanto de LKK

Rezolucio 61/17 de la Generala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj Internacia Jaro de Akordiĝo 2009

Novaj direktoj en la formado de E-instruistoj, Kiel ni povas uzi reton por reklami Esperanton kaj helpi al instruado de Esperanto k.s.). Merredo estas jam tradicie ekskursata tago, tamen kiu ne volis turisti, povis aŭskulti prelegojn pri Esperanta literaturo.

La kongresa kuriero aperis en 8 numeroj kaj alportis interalie ankaŭ opiniojn de gravuloj, kiel Esperanto evoluos ĝis 2059 (200-a datreveno de Zamenhof). Partoprenis H. Tonkin, R. Corsetti, G. Hinker, P. Daŝgupta, G. Grattapaglia, R. Dobrzynski, R. Clerici, S. Ó Riain kaj R. Selten. Oni supozas, ke Esperanto ankoraŭ ne venkos, sed ligos kunlaboron kun aliaj organizoj, precipe zorgantaj pri bonfaraj kaj kulturaj celoj.

UEA akceptis novan landan asocion, Mongolion, kaj tiel atingis nombron de 70 membro-landoj.

La kongreson iomete ĝenis incidento kun ekstremuloj, kiuj ĵetis farbon sur la statuon de Zamenhof, eble pro lia judeco.

En Belartaj Konkursoj ricevis premiojn poemoj *De tiu ĉi ĝarden' Narnia* kaj *Esja* de Nicola Ruggiero, *Tro rapide* de Jean-Marie Ries, prozaĵoj *Viola* de Julia Sigmond kaj *Ranoj* de Sten Johansson, eseoj *Ni ne entombigu niajn literaturajn trezorojn* de Lena Karpunina kaj *Lingvo kaj dialekto* de Geraldo Mattos, infanlibro *Ĉirkaŭ la mondo dum 80 tagoj* de Jules Verne, eldonita de Sezonoj, kanto *Minimuma familio* de Geraldo Mattos, filmo *Stelo de Bona Espero*

de Ardaci Sousa kaj poemo *Ĥodapro en tarda sorpotempo* de Folke Wedlin (nova talento).

Rekomendataj retpaĝaroj (daŭrigo)

<http://informado.net/> Kolektejo de faktoj pri Esperanto, konsiloj pri informado, elŝuteblaj informiloj

http://eo.wikipedia.org/wiki/Esperantaj_vortaroj_en_la_reto

Listo de Esperantaj vortaroj kaj terminaroj, kiuj estas libere konsulteblaj aŭ elŝuteblaj per Interreto

<http://www.eventoj.hu/ret-info.htm>

senpaga retpoŝta novaĵservo el Esperantujo

<http://www.eventeo.net/> Novaĵportalo pri NEesperantaj temoj tradukitaj Esperanten el la internacia gazetaro

<http://www.bongo.ne.jp/~teg/radio/esperanto.htm> Informoj pri E-radioelsendoj (kun rektaj ligiloj)

[http://www.gutenberg.org/wiki/Esperanto_\(Bookshelf\)](http://www.gutenberg.org/wiki/Esperanto_(Bookshelf)) Senpage elŝuteblaj Esperanto-libroj en la Projekto Gutenberg

<http://www.pasportaservo.org/> Nova interreta versio de Pasporta Servo (1350 gastigantoj en pli ol 85 landoj)

<http://www.esperanto.mv.ru/Ek/>

Programo Ek!, libere elŝutebla, ebligas simple tajpi Esperante kun supersignoj

<http://members.aon.at/aldone/konvertilo.html> Konvertilo – programo, kiu per unu klako transformas vian tekston kun x aŭ h al teksto kun E-supersignoj (ne necesas instali!

<http://mpovorin.narod.ru/ludoj/ludoj.html> Kolekto de interretaj ludoj en Esperanto, libere elŝuteblaj (kun referencoj al aliaj paĝaroj)

-padv-

Internacia Junulara Kongreso Liberec 2009

Historia evento finiĝis la 25-an de julio 2009 en Liberec, kie Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ) okazigis la 65-an Internacian Junularan Kongreson (IJK) de TEJO, kun pli ol 330 partoprenantoj el pli ol 40 landoj (precizaj nombroj ankoraŭ ne publikiĝis). Unuafoje en historio la IJK okazis en Ĉeĥ(oslovak)io kaj la aranĝo tiel enviciĝis apud la plej prestiĝajn kiel la UK-oj 1921 kaj 1996. Organizis la kongreson kvaroncento da junuloj, precipe el Ĉeĥio, Germanio kaj Pollando, prezidataj de Marek Blahuš.

La kongreso okazis en bloko C de la universitata studenthejmo Harcov kaj ĝia temo estis *Liberec'* (vortludo pri la kongresurbo). Plurfoje la esperantistoj eliris en la publikon. Dimanĉe la 19-an de julio en la urba ĉefpreĝejo celebris sanktan meson en Esperanto Miloslav Kardinalo Vlĉ. Merkrede sur la ĉefplaco la kantisto JoMo rompis sian rekordon kantinte en 25 lingvoj dum unu koncerto. Ĵaŭde samloke okazis sukcesa Kultur-Lingva Festivalo finita per koncerto de Kimo. Samtage vespere publike koncertis en klubejo Vlak brazila esperantista rokgrupo Supernova.



foto: Marek Blahuš

Elstara estis ankaŭ la amaskomunikila laboro. Pluraj gazetoj, radiostacioj, televido kaj presagentejoj raportis pri la kongreso, eĉ ekster la limoj de la kongreslando. Plej valora estas la triminuta

raporto de la germana televido ARD parolata preskaŭ tute en Esperanto kun germanaj subtekstoj, kiun spektis pli ol duonmiliono da germanoj. Detala listo de amaskomunikilaj aperoj daŭre kompilatas, ĝoje ni ricevos atentigojn pri aperintaj raportoj ĉe la ret-adreso

cxej@esperanto.cz

Spektu videoraporton pri la IJK de irlandano Benio LEWIS (en la ĉeĥa!) ĉe <http://tinyurl.com/ijk2009beniocs>

aŭ vidu la paĝaron de IJK ĉe <http://ijk.esperanto.cz/> aŭ tiun de ĈEJ ĉe <http://cej.esperanto.cz/>

100 jaroj de Esperanto en Pardubice



foto: Pavel Nechvíle

En 1909 D-ro Stanislav Schulhof fondis en Pardubice klubon, kiu nun portas lian nomon. La lernolibro de Lorenz estis presita en Pardubice eĉ pli frue, jam en 1890. La renkonto okazis inter la 3-a kaj 6-a de julio 2009, kiam jam komenciĝis someraj ferioj – tial eble la partoprenantoj ne estis tiom multaj. Aperis broŝureto pri la datreveno.

František Frýbert 80

La nestoro de la ĉeĥaj radioamatoroj-esperantistoj František Frýbert naskiĝis la 17-an de septembro 1929. Ekde la 1950-aj jaroj li aktivis en la Esperanto-klubo en Brno, kiel atestas konservita filmo pri la tutŝtata Esperanto-kongreso en Brno en 1950. Tiutempe li ankaŭ membris en amatora teatra grupo Verda Masko. Liaj klubaj prelegoj pri Aztekoj, Argentino, Centra Azio, Deveno de poŝtmarko pravas liajn interesojn, inter kiuj elstaras lia radio-amatorado. Ekde la 1990-aj jaroj li uzas ankaŭ paked-radion, kio estas perradia „interreto“ (oni skribas tekston per komputilo kaj forsendas per radio al alia radio-amatoro). Kiam en 1969 en Brno estis fondita la nuna Ĉeĥa Esperanto-Asocio, li surbendigis la agadon de la kongreso, sed bedaŭrinde li mem ne scias, kie nun troviĝas la bendo. Espereble ĝi ankoraŭ aperos.

Jarmila Čejková

Inter la ĉi-jaraj jubileuloj ni ne rajtas forgesi ankaŭ nian asocian kronikistinon, kiu post la karmemora Drahoš Kočvara transprenis la kolektadon de artikoloj pri Esperanto kaj pri nia asocio en la ĉeĥa gazetararo, kion ŝi plenumas modele (se esperantistoj ne forĝegas sendi al ŝi eltondaĵojn). En juneco en Brno ŝi rajdis ĉevalojn kaj aktorinon en Verda Masko de Esperanto-klubo en Brno, poste la familia vivo forkondukis ŝin al norda Moravio (Frýdek-Místek kaj Ostrava). Du siajn nepojn ŝi venigis al SET Lančov, kie ŝi mem plurfoje laboris, helpante al sia amikino kaj sam-jubileulino Věra Podhradská (kiun ni intervjuis en la antaŭa n-ro de Starto).

Karel Franc kaj SET Lančov

Komence de la 50-aj jaroj de la pasinta jarcento, precizan jaron mi jam forĝesis, mi vizitis mian unuan renkontiĝon de esperantistoj, kiu tiam okazis ie ĉe malnova stacidomo de Pardubice. La konferencon organizis kaj gvidis estro de la loka E-klubo Karel Franc. Partoprenis ĉirkaŭ 40 personoj. De ili mi memoras jam nur kelkajn: Karel Kraft kun kiu mi sidis ĉe la tablo kaj la nunan kardinalon Miloslav Vlk.

Precize mi memoras Karel Franc kaj Karel Kraft de la 3-a etapo de SET en Chvalatice, kiun mi ankaŭ gvidis en la jaro 1955. De aŭtuno de tiu jaro mi por du jaroj soldatservis. Bedaŭrinde. Post la reveno hejmen, mi tuj komencis organizi SET-on. Bedaŭrinde la lokon en golfo de Chvalatice mi jam ne trovis libera. Mi do trovis liberan belan herbejon en golfo de katastro Lančov. Tie mi do organizis mian 8-an SET-on. Ĝin partoprenis ankaŭ amikoj: Karel Franc kaj Karel Kraft. De tiu tempo Karel Franc komencis organizi por SET ĉeeston de geinstruistoj. Kaj ĉiun jaron li vizitis unu el la etapoj kun la funkcio de ĉefinstruisto. Dum la jaroj li vizitis SET-on ĉiam dum laborbrigadoj. Lia laboro estis ekzemple akvokondukilo de nia puto al la kuirejo kaj al la lavejoj. Li kun siaj membroj en Pardubice konstruis 10 kabanojn de la tipo Junior. Kelkaj servas ankaŭ hodiaŭ, kiam okazas jam la 57-a SET. Dekojn da jaroj Karel gvidis ne nur la E-klubon en Pardubice, sed perfekte zorgis pri nia SET. Bedaŭrinde venis malsano kaj Karel jam ne plu povas en sia 84-a jaro SET-on viziti. Li estas neforgesebla homo. Karel, mi tre dankas por via laboro! Restu ankoraŭ longe inter ni.

Pavel Sittauer

Nia filmo



Radio Pekino subskribas memorlibron de Svitavy



Esperanto-rondeto en Okříšky
(foto Mgr. Vítězslav Bártl)



Renkonto en Chropyně laŭ spuroj de reĝo Ječmínek



Ĉeĥa episkopara konferenco honoris s-anon Miloslav Šváček pro lia laboro per Esperanto



12.9.2009 Jaroslav Suchánek legas fabelon en Esperanto por la televida programo **La horo de la vero**

Ĉi-jara EKOTUR okazis en Bohemia-moravia limlando

Jam tradicia aranĝo EKOTUR por ŝatantoj de aktiva, ekologie konceptita turismo okazis ĉi-foje fine de aŭgusto en ĉarma regiono inter Bohemio kaj Moravio. Ĝiaj partoprenantoj el kvin landoj (Ĉeĥio, Germanio, Belgio, Francio, Kanado) ĝuis buntan elekton de ekskursoj tra la distriktoj Svitavy (urbo Svitavy kaj riverfontoj de Svitava, Litomyšl - inkluzive viziton de la tombo de Karolo Piĉ, burgo Svojanov, instrupado ĉirkaŭ Polička, Česká Třebová, Kozlov) kaj Chrudim (rokoka kastelo Nové Hrady, Proseč, rokaro Toulovcovy Maštale) – piedmigrantoj sub gvido de la ĉeforganizanto Petro Chrdle, biciklantoj sub gvido de Miloš Bloudek el Karlovy Vary.



Vesperoj, okazintaj plejparte en la Muzeo de Esperanto en Svitavy, estis dediĉitaj al interesaj prezentoj pri ekologiaj temoj (Petro Chrdle enkondukis al la problemaro de ekoturismo kaj raportis pri mediprotektado en Ĉeĥio kaj pri Ŝumava, Wolfgang Westermayer pri verdaj partioj kaj Esperanto kaj pri negativaj postsekvaj de plastaĵoj en akvaro, Normand Fleury el Botanika Instituto en Montreal faris prezenton pri problemaro de la tutmonda senarbarigo kaj pri manĝeblaj floroj, Margit Turková rakontis

pri naturekskursoj dum UK en Bjalistoko kaj Pavla Dvořáková montris ekoturismajn artikolojn, precipe pri Ĉeĥio, en la esperantlingva reta enciklopedio Vikipedio). Sed restis tempo ekz. ankaŭ por vizito de rokenrola koncerto kaj por komuna muzikumado kun akompano sur gitaro kaj piano ... Mi kore dankas al la ĉeforganizanto kaj al la loka E-klubo kaj direktorino de la loka muzeo por preparo de la interesa programo!



Por la aranĝo estis mendita favora vetero kaj regis dum ĝi daŭre agrabla familia etoso, kiun mi ankaŭ al vi dezirus kunĝui. Ĉu vi eble pensas, ke vi ne estas tiom sana aŭ sportema por povi elteni ĉiutagajn ekskursojn? Sendube nenio el la programo estas deviga kaj oni kune kreas la itinerojn laŭ komuna interkonsento. Krome, onidire la sekvontjara aranĝo eble okazos en Suda Bohemio en la regiono Třeboň – kies ebeneco sendube ne estas tro postulema por fizikaj fortoj. Ĉu ankaŭ vi eventuale jam pripensas estonte veni?

Pavla Dvořáková

Koncize pri E-Lingvo

E-Lingvo havas post unu jaro kaj duono da ekzisto ĉ. 150 membrojn, de pluraj naciecoj. Ni atendis kelkmil membrojn, do la atingita nombro ne estas tre ĝojiga. Tamen ankaŭ tiel ni viciĝis en Ĉeĥio inter grandaj civitanaj societoj.

Dum unu jaro estis farita sufiĉe granda laboro. Estiĝis bonkvalita portalo www.elingvo.eu, kiu enhavas kvanton da informoj pri lingvaj rilatoj kaj konsekvencoj. Ampleksa teksto en pluraj lingvoj konatigas kun problemoj de komunikado kaj proponas kiel unu solan racion solvon enkondukon de komuna, regula, sennacia tuteŭropa lingvo. Kiel la plej taŭga kandidato por la funkcio de eŭropa lingvo prezentiĝas la jam praktike elprovita Esperanto. Esperanto fakte per siaj radikoj estis eŭropa lingvo ekde sia komenco.

E-Lingvo intencis alparoli la vastajn tavolojn de loĝantaro en Ĉeĥio kaj Eŭropo per lavange koncentrita propagando en amaskomunikiloj. La plano malsukcesis, ĉar aliro al amaskomunikiloj estas hodiaŭ efektive blokita per la nuntempaj cirkonstancoj. Ni turnis nin al amaso da gvidaj personoj, politikistoj, ĵurnalistoj, organizoj, gazetaroj, radioj kaj televidoj. Same finiĝis la alparolo de sponsoroj. Malgraŭ dekoj da leteroj kaj centoj da retmesaĝoj estis la respondo nula. Ĉi-voje daŭrigi ne eblas, por reklamitekstoj ni ne havas rimedojn. La strategio devas do ŝanĝiĝi.

Por propagandi estis presitaj broŝuroj en la ĉeĥa. Tiuj ankoraŭ estas disponeblaj. Ili estas videblaj ankaŭ en la portalo en la rubriko „Utilaj informoj“. La plej granda propagandilo fariĝis nia portalo, kiun ĉiumonate vizitas preskaŭ mil homoj.

Ĉar la politikistoj turnas al ni sian dorson, ni vidas neceson batali ankaŭ per politikaj rimedoj, tiel ekestis ideo de politika partio. Estis elektita la nomo Civitana Partio (ĉar ni celas alparoli ĉiujn) kaj estis fondita ĝermo de la partia portalo www.obcanskastrana.info.

Ĉar ni ne havas sufiĉe da homoj nek rimedoj, ni klopodas konvinki voĉdonontojn per novaj ideoj. Kelkaj jam troviĝas en la portalo, sed pli multaj estas preparataj. Ni serĉas saĝajn homojn, kiuj volus helpi. Ni ne povas ĉion scii mem.

Ankoraŭ al ni mankas ĉirkaŭ 600 subskriboj, sed plej urĝaj estas novaj ideoj kaj altkvalite ellaborota statuto kaj propagande konvinkaj tekstoj. Eblas, ke kelkaj ideoj kiel ekzemple limigo de la potenco de politikistoj aŭ batalo kontraŭ burokratismo ne estos tuj komprenitaj, sed post klarigo la ordinara homoj ilin akceptas bonvene.

Ne ekzistas ŝanco partopreni en la nunaj balotoj, sed en la lokaj kaj la venontaj post kvar jaroj tio eblus. Sed sen granda helpo de bonaj homoj ne.

Kunlabore kun junaj membroj ni intencas utiligi Facebook-on kaj interreton ĝenerale.

Nian aktivadon ŝarĝas nesufiĉo da kapoj, manoj kaj rimedoj.


Ni preparas principan tekston en la angla, kiu en formo de libreto resumos ĉiujn aspektojn de komunikado kaj de lingvoj kaj montros neeviteblon kaj ekonomian neceson enkonduki tuteŭropan sennacian lingvon. La teksto estos disvastigata inter la ŝtataj institucioj kaj eŭropaj strukturoj.

Esperantistoj proprasperte scias, ke la tempo fluas kaj novaj ideoj malfacile sin trapuŝas. Kiu povas, helpu nian utilan kaj tute senprofitan filantropan laboron.

Nome de la estraro de E-Lingvo D-ro Pavel Lehký

Novaj libroj

Zdeněk Pluhař: **Chemický slovník esperantsko-český a česko-esperantský**, KAVA-PECH 2009, 202 p.



Elena Popova: **Rim-enigmoj**, il. Miroslava Tomečková, KAVA-PECH 2009, 56 p.

Bent Jensenius: **Bonvenon en nia mondo**. Legolibro por komencantoj. KAVA-PECH 2009, 128 p.


Esperanto – instrumento de fakuloj. KAVA-PECH 2009, 134 p., prelegaro de KAEST 2008.

Esperantologio, n-ro 4, KAVA-PECH 2009, 102 p. Artikolaro: *Bazformoj de radikoj en vortaroj, Universalaj lingvoj en Svislando, Lingva fono kaj uzado de frazstrukturoj, Lazar Markoviĉ Zamenhof, Historio kaj planoj de nova Esperanto-Muzeo en Svitavy.*

Ĉestmír Vidman: **Sedmnáct slabik – Dek sep silaboj**. Tr. Jaroslav Krolupper, il. Jaroslav Krpejš, 81 p., eld. Petr Dvořák 2009.

Zdenka Bergrová: **Podzimní měsíc – Aŭtuna luno**. Tr. Jaroslav Krolupper, il. Věroslav Bergr, 96 p., OFTIS 2009.

Malkovru Esperanton. Fascina lingvo. E@I - ILEI 2009, 23 p. Propagandilo tradukinda nacilingven: <http://ikso.net/broshuro/provo/MalkovruEsperanton.pdf>



Objavte esperanto. Fascinující jazyk. Tr. Ľubomír Fajth – Rastislav Šarišský, slovakaj eldono de la propagandilo.

Carmen Cassinis: **Vivovero de virino. Memoraĵoj (1895-1920)** diktitaj al la filo Filippo Franceschi kaj de li esperantigitaj. Editura Triade, Cluj 2009, 131 p.



Memorlibroj en Esperanto havas longan tradicion. En tiu ĉi libro rakontas ordinara, tamen interesa virino pri siaj travivaĵoj de antaŭ cent jaroj kaj jam pro tio interesaj. La fluan tradukon reviziis Júlia Sigmond kaj Carlo Minnaja.

Kantoj de Jarek Nohavica en Esperanto!

En la oficiala retejo de tre populara ĉeĥa folkkanzonisto Jarek Nohavica vi povas ekde aŭgusto trovi rubrikon kun tradukoj de pluraj liaj kantoj al Esperanto. En www.nohavica.cz klaku al la unua (ĉeĥa) flagejo kaj tie en menuo vi trovas rubrikon *překlady: PL-EN-D-I-HUN-ESP*. Klakinte al ESP vi malfermas paĝon kun 9 tradukoj – sep de fama pola E-bardo Georgo Handzlik, po unu de talenta ĉeĥa kantotradukisto Vladimír Türk el Netolice kaj de germana ipernitiano el Altenburg konata sub alinomo Cesar.

Vi trovas tie ekz. famajn kantojn *Dokud se zpívá, Když mě brali za vojáka, Pijte vodu, Sarajevo* k.a. La du unue menciitaj tradukistoj kontaktis la kantiston ĉi-jare kun peto pri aperigo de la tekstoj. Tiu onidire ne kontraŭis, sed diris, ke tio dependas pri decido de lia retmastrumantoj, kiuj devas konvinkiĝi pri efikeco de tia paŝo kaj pri ekzisto de Elingva publiko. Sekvaj aktivecoj lige al tio instigis esperantistojn individue retpoŝte montri intereson pri tio kaj la rezulto fakte estis sukcesa. Koran dankon al ĉiuj, kiuj engaĝiĝis en la kampanjeto!

Ni petas viajn favorajn retmesaĝojn ĉe webmaster@nohavica.cz, ev. ĉe la kantisto mem (jarek@nohavica.cz). Reeĥoj el eksterlando estas aparte bonvenaj!

Ankoraŭ mankas en la rubriko „Vlastní tvorba“ enmeti esperantan ikonon ĉe la naŭ esperantigitaj kantoj

(vidu ekz. <http://www.nohavica.cz/cz/tvorba/texty/>

[kometa.htm](http://www.nohavica.cz/cz/tvorba/texty/), kie estas indikoj pri la tradukoj al kvar aliaj lingvoj, sed Esperanto ankoraŭ ne estas signita). Viaj pliaj reagoj kaj petoj sendube helpos plu promocii la aferon!

Tiu ĉi sukceso certe helpas prestiĝigi Esperanton inter ŝatantoj de moderna folkmuziko en Ĉeĥio. Ni klopodu pri ĝi taŭge informi inter publiko!

-padv-



*aŭtoro de fotojaĵo Janothird, fonto
Wikimedia Commons*

MUJWEB malaperis

La servilo Mujweb.cz estis unu el la plej malnovaj ĉeĥaj senpagaj serviloj, kiun uzis ankaŭ multaj esperantistoj. La entrepreno ĉesigis la 15-an de septembro 2009 la funkciadon de sia servo, sekve miloj da retejoj malaperis kaj ligoj ĉesis funkcii. La uzantoj devas serĉi aliajn servilojn, kiuj ofte postulas diferencon prilaboron de dosieroj, tial la revivigo iom daŭros.

Datumbazo da faka literaturo esperantlingva ĉe la interreto: geologio kiel komenco

Danke al ebloj de teksto-serĉado kaj tuja bildigo de koncernaj dokumentoj pere de hipertekstaj ligoj la interreto enorme rapidigas laboron kun specialigitaj informoj. Temas precipe pri materialoj destinitaj por malvasta rondo de interesatoj, kiujn presi en gazetoj aŭ elsendi en televido ne estus finance avantaĝa. Tia estas ankaŭ plejparto de la faka literaturo. Multaj ĝis nun valoraj laboraĵoj restas preskaŭ nekonataj, ĉar neniu scias pri ili kaj se jes, estas problemo ilin akiri. Tio avantaĝigas „tutmondigajn“ fakajn publikaĵojn, en kiuj estas pli-malpli (laŭ la fakoj) trapuŝata la angla kiel sola internacia lingvo.

Koncerne la fakan literaturon en Esperanto, ni decidis ŝanĝi la situacion per pli granda utiligo de la interreto. La komencon montras la datumbazo de geologia literaturo, lokita provizore ĉe la retejo: <http://gchmin.ic.cz/isae/proviz/seznamvse.html>. En la tempo, kiam la aŭtoro verkas tiun ĉi tekston, la datumbazo enhavas relative malmultan nenovan literaturon, sed tio rapide ŝanĝiĝos danke al enkomputiligado de resumoj el malnovaj artikoloj, kion ni devas danki al Dana Sklenářová. Se la aŭtoro konsentas, ni publikigas la tutan tekston kun bildoj.

Por rapida disvastigo inter la legema publiko servas pluraj popularsciencaj

tekstoj, ekz. pri fosilioj kaj pri vivo-evoluo en Prago kaj ĉirkaŭaĵo aŭ gvidlibreto pri Sovaĝa Ŝaro.

Por estonta disvastigo de la datumbazo je aliaj fakoj kaj ĝia taŭga ligo al jam ekzistantaj datumbazoj de "neesperanta" literaturo estis registrita (provizore ĝis la fino de 2009) domajno <http://isae.info>, kie oni kalkulas kun profesia administrado kaj funkciado sen reklamoj. Tio kompreneble kostos certan monon (ĉ. 860 Kč jare), sekve financado de tia afero fare de unuopulo ne estas memkomprenebla, sed por internaciaj Esperanto-organizoj ĝi ne devus esti problemo. Mi opinias, ke la projekto meritas, ke la ĉefaj esperantistoj akceptu ĝin kiel unu el siaj prioritatoj sur la internacia nivelo.



Esperanta geologia literaturo en interreto

Scienca literaturo:

Kompletaj tekstoj:

Jurnalo Geologio Internacia:

J. Mabesoone (2007): [Cikleco en la geologia ev](#)

Ni alvokas ĉefe la aŭtorojn, ke ili esprimu (mal)konsenton kun publikigo de tutaj tekstoj de iliaj traktaĵoj. Memkomprene ni ankaŭ dankos por kompletigo de informoj precipe pri malnovaj laboraĵoj, eĉ por sendado de iuj verkoj (se la aŭtoro konsentas), speciale se ne temas pri artikoloj en ĵurnaloj Geologio Internacia aŭ Scienca Revuo.

Václav Procházka

Ora nupto

En la tria etapo de Somera Esperanto-Tendaro en Lančov okazis eksterordinara evento, la ora nupto de geedzoj Novobilský, kiuj antaŭ 50 jaroj konatiĝis per Esperanto kaj intimiĝis en SET. La surprizon preparis iliaj du filinoj, kiuj per aŭto ilin transportis al sekreta loko. S-ino Věra Novobilská estas filino de la fama tradukisto Jiří Kořínek (1906-1988), prof. Vlastimil Novobilský verkis plurajn tekstojn pri literaturo en Esperanto kaj ankaŭ manenan kaj vesperan kantojn, kiujn oni kantas en la tendaro ĝis nun. Komune ili ofte deklamas poemojn.



El Lančov venis vera pastro, kiu efektivigis ceremonion de „geedziĝo“ eĉ kun fingroringoj ornamitaj per nombro 50.

Semajnfine venis eksaj tendaranoj por sia tradicia renkontiĝo, ili gratulis al la jubileuloj. En la tendaro festis sian jubileon ankaŭ Věra Podhradská, kiu same kiel Jarmila Čejková apartenas al samaĝuloj de Eva Pilarová kaj Karel Gott.

Ĉi-jare estis la plej forta la unua etapo, preskaŭ sepdek personoj, en la dua je dudek malpli kaj en la tria nur ĉirkaŭ dudek. La duan semajnon de la tria etapo fortigis grupo el Brno kaj la jam menciitaj jubileuloj kaj eksaj tendaranoj. La junuloj de la unua etapo promesis profesie prilabori la tendaran interretan prezentadon kaj tiel plibonigi varbadon por la sekva jaro.



Tendaranoj de la dua etapo (fotis Josef Filip)



Eksaj tendaranoj (fotis Vladimír Rataj)

La renkontiĝon de la eksaj tendaranoj partoprenis ankaŭ gasto el Svislando Roman Kocián kun la edzino kaj el Slovakio Stano Marček kun siaj edzino kaj filino (ili venis post fotado).

Komitatanoj de ĈEA



Por tiuj, kiuj ankoraŭ ne konas la asocian komitaton (de maldekstre): Pavel Polnický, Jana Melichárková, Libuše Dvořáková (kontrolgrupo), Jiří Tomeček, Libuše Hýblová, Pavla Dvořáková, Petr Chrdle, Miroslav Malovec.

MAJA VOJO AL BUDĚJICE

Tiel nomiĝis unutaga regiona renkontiĝo, okazigita 13.5.2009 de E-klubo Písek.

Danke al M. Smyčka la partoprenantoj povis viziti antaŭtagmeze neoficialan antaŭpremieron de ĉarma baroka-klasikisma opero „Astrologo“ de G. Paisiello en Sudbohemia Teatro, kun unika ebleco enrigardi ankaŭ laborspacojn mal-

antaŭ la scenejo. Komuna tagmanĝo kun babilado estis agrabligita per E-kantado kun gitaroj. La posttagmezon oni dediĉis al vizito de interesa ekspozicio pri „Šumava de Klostermann“ en Sudbohemia Muzeo. Danke al gasto el Aŭstrio oni povis bonŝance eviti krokodiladon kaj povis tiel plene ĝui agrablan praktikadon kaj perfektigadon en nia lingvo.

Letero de UEA

Ni memorigas la eblecon membriĝi en la ekonomia kategorio MG, tio estas Membro kun Gvidlibro. En Ĉeĥio la jara kotizo egalas al 170 kronoj.

En la 1980-aj jaroj oni kreis la kategorion MG, por ke ekzistantaj membroj povu malmultekoste membriĝi siajn favorajn al Esperanto familianojn kaj donaci membrecon al amikoj kaj konatoj. Ni uzu tiun okazon pli vastskale.

Ni memorigu, ke la Jarlibro de UEA estas unika dokumento, kiu nunjare eniris sian 100-an ekzistojaron. Ĝi enhavas priskribon de ĉiuj ĉefaj agadoj de UEA, ĝiaj Oficejo kaj institucioj; la nomojn, adresojn kaj taskojn de ĉiuj komitatanoj, komisiitoj kaj aliaj respondeculoj de la asocio; adresojn kaj mallongajn priskribojn de ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj, kulturaj kaj sciencaj institucioj ktp; praktikajn informojn pri transpagado, telefonado, korespondado, kaj uzado de la Delegita Reto; nomojn, adresojn kaj fakojn de preskaŭ 1800 delegitoj kaj fakdelegitoj en 102 landoj de la mondo.

*Barbara Pietrzak
Ĝenerala Sekretario*

Kiel Esperanto povas transvivi la 21-an jarcenton?

Jen la titolo de laborseminario, kiu okazis sabate la 29-an de aŭgusto 2009 en la Muzeo de Esperanto en Svitavy, tuj post fino de la internacia aranĝo EKOTUR. La aranĝon iniciatis kaj gvidis Pavla Dvořáková el Písek, kiu en la ĈEA-estraro nuntempe prizorgas klubojn kaj asociajn projektojn – tial en la programo estis ligitaj ambaŭ sferoj. Partoprenis reprezentantoj de kluboj el (alfabete) Brno, Česká Třebová, Havířov, Mladá Boleslav, Praha, Přerov, Příbram, Svitavy, Šumperk, Znojmo kaj du gastoj el la germana Kassel.

La celo estis komuna pridiskuto de kreo de la kompleksaj vizio kaj strategio de ĈEA, sed ankaŭ reciproka informiĝo pri lokaj aktivecoj kaj konkreta preparado de kelkaj projektoj (kontribuado al multkomunikila datumbazo kaj DVD pri ĈEA, estigo de migranta ekspozicio pri Esperanto). Estis substrekite, ke nek la kluboj nek la asocio povas plu sukcese evolui sen adapti sian laborkoncepton al novaj sociaj kondiĉoj. Gravas proporcie zorgi samtempe pri informado, instruado kaj utiligado de Esperanto, uzante ĉiam pli kaj pli necesajn modernajn teknologiojn. Komputila klerigado de la membraro celu al pli vasta kaj efika uzado de elektronika komunikado, uzado de E-retpaĝaroj kaj kreado de modernaj E-dokumentoj (tradukado de urbaj retpaĝaroj, vikipediaj artikoloj, ciferecigo de E-libroj, registrado de sondosieroj kaj videofilmetoj en Esperanto ktp.) Kluboj, en kiuj ofte restas nur 3-5 membroj (en iuj eĉ malpli) klopodu koncentriĝi pri realigo de konkretaj projektoj kunlabore kun aliaj kluboj aŭ grupiĝoj. Menciita

ekzemplo estis EK Písek, kiu sukcesis jam dufoje atingi 30.000,- Kč de la urbo (el eŭropaj fondusoj) por sia seminario „Sabla Printempo“ – ne por disvastigi Esperanton, sed por evoluigi regionan turismon PERE de Esperanto (do pere de kreado de turismaj informmaterialoj pri la urbo kaj pri Sudbohemia regiono ĝenerale).

Gravas, ke ni uzu Esperanton por fari ion utilan kaj agrablan ne nur por ni mem, sed ankaŭ por plibonigo de la cetera (neesperanta) mondo – en tio ni havas ankoraŭ multajn rezervojn.

Necesas eliri el nia fermiteco, kaj pli celtrafe kunlabori ankaŭ kun nemembroj de ĈEA (tiel jam foje okazas), kun gejunuloj (ekz. kiel lektoroj por komputila klerigado) kaj kun neE-organizoj kun en io similaj celoj kaj klopodi pli utiligi profesiajn kapablojn de niaj membroj.

Gravas ne timi komenci ion novan pro manko de homoj kaj mono. Ofte troviĝas volontuloj, se ili ekscias ekzakte, kion kaj kiel ili faru kaj se ili certas pri utileco de tia aktiveco.



Por klerigado estis uzataj eĉ la ripozpaŭzoj (foto –padv-)

Krome, komputila teknologio nun-tempe ebligas realigi grandajn projektojn (antaŭe neimageblajn) preskaŭ senkoste (se jam havante komputilon kaj retaliron kaj uzante liberan programaron). Aliaj senprofitaj organizoj sukcesas ricevi multe pli da financoj, ĉar ili koncentriĝas pri celtrafa subvencia politiko. En niaj petoj ni starigu Esperanton ne kiel celon, sed kiel rimedon (ekz. pri subteno de aktiva maljunaĝo, komputila klerigado, interkultura klerigado kaj forigado de antaŭjuĝoj, faciligo de instruado de fremdlingvoj, pri disvastigo de ĉeĥa kulturo eksterlande ktp.)

Gravas konscii, ke „la asocio“ ne egalas al la estraro, sed al la tuta membraro. Ĉiu povas laŭ siaj kapabloj iel kontribui al la komuna verko.

Dum la konferenco la tuta temaro estos pli detale diskutata kaj estos prezentita nova detalita laborplano, al kies realigo ĉiu membro aŭ nemembro estas elkore invitata partopreni!

Alvoko al ĉiuj ĈEA- membroj – bv. sendi al ni vian retadreson!

Ĉu vi volas ŝpari kaj vian, kaj nian tempon kaj monon kaj kontribui al ĝenerale pli efika komunikado kaj kunlaborado ene de nia asocio? Ni esperas, ke jes!

Tiukaze ni petas vin ĉiujn sendi informon pri via aktuala retadreso al LibuseHyblova@seznam.cz (nuna kaskisto kaj prizorganto de membro-datumbazo) – eble ĝuste la via tie mankas aŭ la indikita ne plu estas funkcia!

Aŭ ĉu vi ankoraŭ ne havas retadreson

kaj ne havas hejme komputilon kun Interreta aliro? Tute ne gravas! Kredu, ke la proceduro kaj uzado estas simplaj, kaj se vi ne havas familianojn aŭ geamikojn, kiuj povus helpi vin, certe vi povas demandi en via loka biblioteko, kie vi povas ĉiusemajne senpage rigardi Interreton kaj kontroli viajn alvenintajn korespondaĵojn. Se vi tamen ankoraŭ ne kuraĝas, ni invitas vin partopreni trihoran kurson pri komputilado por absolutaj komencantoj, kiu okazos (en ĉeĥa lingvo) dum la ĈEA-konferenco en Svitavy. Tie vi povos krei vian elektronikan poŝtkeston kaj lerni legi kaj skribi leterojn kaj serĉi informojn en Interreto. La kurso estas por ĈEA-membroj tute senpaga, por nemembroj ĝi kostas 150,- Kč.

Precipe ni alvokas kaj instigas reprezentantojn de lokaj kluboj por estigi unu oficialan kontaktadreson! Ankoraŭ restas 8 grupoj en ĈEA, kiuj ne estas rete kontakteblaj.

Kompreneble ni garantias vian privatecon – ni ne publikigos sen via permeso vian retadreson kaj uzos ĝin nur por dissendado de informoj, pri kiuj vi interesiĝos.

Unu el la taskoj akceptitaj dum nia kongreso, estis krei dum tiu ĉi jaro elektronikan adresaron de ĉiuj kluboj, sekcioj, komisionoj kaj aktivaj individuaj membroj de ĈEA.

Sen via aktiva kunlaboro ni ne kapablos ĝin plenumi! Koran antaŭdankon por via kunagemo!

*Pavla Dvořáková,
respondeculo pri komputila klerigado en
ĈEA*

Honordoktora titolo por prof. Selten

Nobel-premiito prof. Reinhard Selten ricevis honoran doktorecon de la ekonomia fakultato de la Universitato Göttingen. Dum la ceremonio oni plurfoje menciis Esperanton, kaj prof. Selten mem komencis sian fakprelegon en la internacia lingvo. Kelkajn fotojn pri la evento vi trovos en la fotoalbumo de Esperanto-urbo Herzberg am Harz:

<http://esperanto-urbo.de/gallery.php>

Paroladoj de Ivo Lapenna

Ĉe la retejo de Ipernity aperis paroladoj de prof. Lapenna, kiuj estis filmitaj, do vi povas ne nur aŭdi lian voĉon, sed ankaŭ vidi liajn vizaĝon kaj gestojn dum la parolo. Iru al <http://www.ipernity.com/blog/37943/162592>. Alian retejon dediĉitan al liaj vivo kaj verko vi trovos ĉe <http://www.ivolapenna.org/>.

Inĝ. Vojáček en televido

Ĉeĥa komerca televido Prima elsendas unu el plej sukcesaj amuzaj programoj **Divenu, kiu mi estas**. Kvar popularaj aktoroj devas per demandoj diveni la profesion de invitita gasto, kiu sidas kontraŭ ili. Lunde la 24-an de aŭgusto 2009 estis invitita inĝ. Josef Vojáček. La spektantoj sur la ekranoj vidis, ke li estas instruisto de Esperanto, dum la geaktoroj divenis la veron nur post

plurminuta enketado. Plie ili malkaŝis, ke li instruas la lingvon en Masaryk-universitato. La filmado mem okazis jam en marto 2009.

Ĉeĥa Radio pri Verda Stacio

La 27-an de aŭgusto 2009 elsendis programo *RozHraní* (DisLimo) intervjuon de redaktoro Tomáš Černý kun Dan Mrázek pri la iama Verda Stacio de Ĉeĥa Radio. Telefone diris kelkajn vortojn M. Malovec. Konservigis eĉ unu sonprelego de František Kožík, voĉoj de K. Höger kaj K. Kalaš. La podkaston vi povas trovi ĉe http://www.rozhlas.cz/podcast/media/_audio/00985626.mp3.

Sedmička pri Esperanto

La gazeto Sedmička de Mladá fronta publikigis la 28-an de julio 2009 intervjuon kun s-ano **František Rytíř** el Tábor (omaĝe al lia 80-jariĝo) sub titolo **Li konas lingvon, kiu provokas diktatorojn** (www.sedmicka.cz/tabor/clanek?id=25946). D-ro Rytíř kiel veterinara kuracisto estas en la urbo Tábor tre konata kaj populara.

La 1-an de septembro 2009 la sama gazeto alportis intervjuon kun **Pavel Polnický** sub titolo **Esperanto ne estas danco**.

(www.sedmicka.cz/kolin-kutna-horanyburk-podebrady/clanek?id=43221).

La artikoloj aperis en la regionaj versioj de tiu gazeto.

Esperanto en malluksa Afriko

La plimultiĝo de esperantistoj en kelkaj tre malriĉaj landoj montras, ke Esperanto ne estas nur luksaĵo praktikata de intelektuloj en riĉaj landoj. Statistikoj mankas, sed se dedukti el la novaĵoj en 'ESPERANTO EN AFRIKO', bulteno de la Afrika Komisiono de UEA, la kursoj multobliĝas dum la lastaj jaroj en Togolando, Benino, kaj Burundo, dum en aliaj landoj: Malagasujo, Angolo, Niĝerlando kaj Eburua Bordo (kelkaj ankaŭ diras Kotdivuaro) la organizaĵoj de esperantistoj estas bone establita kun kongresoj, okazas kursoj, ekzamenoj ktp.

Dum Afriko enhavas 54 suverenajn ŝtatojn, en 23 el ili esperantistoj estas konataj internacie kaj esperantaj grupoj konatas en 17 landoj. Ok el tiuj dek-sep havas landajn asociojn aliĝintajn al UEA. Unu fakto devus alarmeti nin: Tiuj ok landoj, malkrom Sud-Afriko, estas ĉiuj franclingvaj. La nuraj anglalingvaj landoj, kie vivas esperantistoj estas Tanzanio kaj Ganao. Ne povas ne esti rilato kun tio, ke la angla estas sufiĉe superregema aŭ/kaj Esperanto forte apogiĝas sur la franclingva vortotrezoro.

En pasinta januaro Svetlana Milanović kaj mi mem donis kursojn por komencantoj kaj progresantoj en Burundo, ĉe la lago Tanganjiko, unu el la dek plej malriĉaj landoj de la mondo. Ni suferis malluksecon, maleston de taŭgaj nutraĵoj, noktan bruadon kaj malpurecon, sed ni hontas diri tion, ĉar la periodo de suferado por ni estis nur unu monato, do pli bone plendu pro la daŭraj suferadoj de la afrikanoj ol pro la propraj nekonvenaĵoj.

Ĉar la entuziasmo por niaj kursoj estis ege granda, ni engaĝiĝis ne nur bone instrui ilin, sed ankaŭ trovi manierojn por helpi organizi ilian asocion. Pro la malriĉeco kotizado de membroj de kluboj estas nepraktikebla. Jam kurslibrojn la burundanoj ne povas aĉeti kaj se iu havas kurslibreton, ĝi estas baldaŭ ĉifonita pro eluzado tra multaj fingroj, pro manko de bona formetujo, ekzemple libroŝranketo. Kion fari? Ni elpensis kaj decidis helpi starigi Esperanto-centron, kie la lokaj esperantistoj povos renkontiĝi, kie gardatos Esperanto-libroj kaj kie, por havi enspezojn, estos komputiloj kun ret-aliro por la paganta publiko. La konstruado de la centro devos esti financata pere de monvarbado inter pli riĉaj esperantistoj en la mondo.

En la pasinta jaruono ni fondis fondaĵon "Esperanto en evoluo" kun propra retejo, kiu celas ne nur helpi financi la Esperanto-centron en Burundo, sed "ĉiujn profitodonajn projektojn en malriĉaj landoj, kiuj celas doni bezonatan financon bazon al la tiea Esperanto-movado", tiel tekstas la statuto. Nia kampanjo komenciĝis dum la Universala Kongreso, kun ankoraŭ nekonata sukceso, sed certe la burundaj esperantistoj bezonas ankaŭ financon helpon de legantoj de Starto.

Se vi volas scii pli, klaku al <http://esp-evoluo.tk>, kie vi konatiĝos kun la internacia estraro, la urbo Rumonge, kie la Esperanto-centro estas planita kaj kun niaj amikoj tie. La kontonumero por donaci al la centro estas 1312.96.116 de "St. Esperanto en evoluo" ĉe RABObank, Nederlando (la BIC estas PSTB NL2U aŭ uzu IBAN-numeron NL72RABO0131296116). (Atentu ke post la literoj RABO sekvas cifero nulo.) Ankaŭ ĉe UEA estas konto nia kun kodo eer-u.

Johan Derks

HONORAJ MEMBROJ

Pavel Sittauer (1934)

Motora de Esperanto-klubo en Třebíč kaj de Somera Esperanto-Tendaro en Lančov



1. Vi longe laboris en la skolta esperantista movado. Ĉu vi povas rememori ĝin.

Jes, vi pravas. Mi skoltis 5 jarojn. En la jaro 1950 la skoltismo en nia respubliko estis likvidita fare de komunisma registaro. Oni volis skoltismon anstataŭigi per la organizacio Pionýr, kiu devenis de Sovetio. Prof. Kilian estis amiko de mia patro, kiu estis ankaŭ esperantisto. Mia patro estis ĉeĥa germano. Post la okupado de nia lando fare de naziistoj mi devis foriri de Zlín, kie mia patro instruis lingvojn ĉe eksperimenta lernejo de Bařa. Mia patro protestis kontraŭ la sudetgermana partio de Konrad Henlein. Pro tio ni devis transloĝiĝi al la vilaĝo, tiam germana, ĉe Znojmo. Mia patro direktis la lernejon. De tie li foriris militservi. Ie ĉe urbo Ternopol en Ukrainio li renkontis sian multjaran E-korespondanton. Parolis kun li kompreneble Esperante. Ĉar neniu ilin komprenis, ambaŭ estis ekzekutitaj kiel spionoj. Ĉar la patro estis esperantisto, ankaŭ mi volis esti esperantisto. Pro tio mi kun kelkaj geskoltoj aliĝis al E-kurso, kiun gvidis prof. Kilian. Kaj ankoraŭ dum la

kurso nia grupo aliĝis al Skolta E-ligo. Tiam ni estis ĉirkaŭ 30 personoj. Mi gvidis knaban grupon kaj tiam mia estonta edzino la knabinan grupon. Post likvido de skoltismo mi danke al prof. Kilian, prezidanto de loka klubo, transiris al la klubo. Ni iĝis Esperanto-Junularo. Krom skolta programo en la trupoj ni dum ĉiu kunveno devis unu horon lerni Esperanton. Baldaŭ la E-Junularo havis ĉirkaŭ 200 membrojn. Post du jaroj, kiam la situacio iom trankviliĝis, mi demandis kulturalan inspektoron František Sedláček, kiu interalie estis ankaŭ esperantisto kaj pli poste multajn jarojn instruis en nia SET, ĉu ni povus organizi tendumadon! Jes, respondis li. Sed dum tendumado vi devas instrui Esperanton.

Deziron de la kultura inspektoro ni en la jaro 1952 plenumis kaj ĉi-jare ni organizis jam 57-an SET-on. Kaj dum la tempo ekde la unua SET-o ĝis hodiaŭ mi ŝanĝiĝis el tiam 18-jara knabo en malprudentan kaj maljunan avacon. Kial malprudenta? Ĉar, ĉar mi plu ne volas SET-on organizi! Sed bedaŭrinde ne estas iu, kiu anstataŭos min!


2. Vi estas prezidanto de EK Třebíč, kies ĉefa agado estas SET Lančov.

Jes, vi pravas. Mi estas prezidanto. Ĝis hodiaŭ oni ne trovis iun pli junan. Kaj kio okazis! Dum la tempo ni ĉiam zorgis pri SET-oj kaj ne havis forton organizi kursojn por E-komencantoj en Třebíč. Mankas malpliaĝaj homoj. Vidu, ni estas la plej riĉa klubo en nia respubliko. Ni havas propran domon, kiun testamentis al ni prof. Kilian. Pri nia ĉefa agado mi jam ion diris al vi. Sed bedaŭrinde la SET-on organizis mi kun mia edzino,

helpis Věra Podhradská kaj vi. Ankaŭ helpas niaj genepoj. Ni preskaŭ ĉiuj estas jam maljunaj. Kaj al kiu testamenti nian domon kaj SET-on? Al ĈES, kiu tuj ĝin forvendos kiel la domon en Bor u Tachova?

3. Via klubo riĉigis nian literaturon per multaj publikaĵoj

Antaŭ la dua mondmilito eldonis Moraviaj Pioniroj tradukon de kontraŭmilita dramo **Blanka malsano**. Tradukis ĝin prof. Kilian, kiu uzis ĝin kune kun Karel Höger en la „Verda Stacio“ en Brno. La lernolibro de prof. Kilian estis eldonita kelkfoje. Post la milito estis eldonita nova ekzercaro de Kilian. Eldonis ĝin Pedagogia Eldonejo 4-foje. La klubo eldonis tradukon de **La konstruado en alto** de Otakar Březina. Tradukis Kilian. Por uzo de SET verkis prof. Kilian ekzercaron **ABC de E.**, vortaron **808 la plej uzataj vortoj**, **La Mondo Rakontas**, de J. Vondroušek aperis **Historio de Esperanto** en Esperanto kaj ĉeĥe, traduko de **Ondro kaj drako** de Viktor Dyk kaj **El mia vivo** de V. Nezval. Sekvis **Gramatiko de Esperanto** de M. Malovec kaj **Knaboj de Kastora rivero** de Jar. Foglar, kiun tradukis lanĉovano Dieter Berndt kaj ilustris ĝin akademia pentristo Vlasta Toman.



Miroslav Smyčka (1926)

Operkantisto, fama en Esperantujo pro siaj multaj koncertoj en kongresoj, konferencoj kaj festivaloj.



1. Ĉu vi povas klarigi, kiamaniere vi iĝis kantisto?

Mi naskiĝis la 11-an de septembro 1926 en Olomouc – frekventis realgimnazion en Brno, en la jaroj 1945-1949 universitaton samloke (filozofion + filologion), antaŭ la abiturientiĝo eksigita dum politika enketo – studinte samtempe kanton kaj muzikteorion en muziklernejo kaj konservatorio engaĝita ekde 1949 en la operhoro de Ŝtata teatro en Brno - post militservo kontinuus en operhoro de Silezia teatro en Opava – ekde 1953 komenciĝis mia kariero de opersolisto en operejoj de Liberec, denove Opava, České Budějovice kaj Ústí n. Labem - post mia emeritiĝo mi transloĝiĝis al České Budějovice, kie ĝis nun mi kantas kiel eksterulo en la operhoro.

Kiel knabo mi ŝatis belmelodiajn kantojn publikajn en la preĝejo kaj krome latinliturgiajn mesajn kantojn de la pastro, kiujn mi poste ŝatis imiti hejme. Krome plaĉis al mi operaj kaj operetaj kantoj kaj serenadoj, kiujn mi ĝuis el radio kaj gramofondiskoj de miaj gepatroj. Tiuj ĉi iam hejme "koncertadis" – panjo kantis kaj paĉjo violonis – popularajn melodiojn, ekz. dueton el la opereto Paganini de Lehár.

Jam tiam kaj post la pubereco mi komencis kanti – kaj hejme kaj en la improvizaj kazernoj de la aerŝirma polico antaŭ la militfino. Kaj poste estis mia avinjo (kiun mi ofte preskaŭ surdigadis per mia kantado en la kuir-ejo), kiu decidiĝis pagi por mi kant-lecionojn en la muziklernejo. Tiu ĉi lernado poste ebligis al mi dizerti el la universitato al la kant-rolado en la operejoj.

2. Kiam vi komencis kanti en Esperanto?

Mi esperantistiĝis en la 1950-aj jaroj en Opava, membris tiean klubon, samkiel poste en la 1960-aj en Ĉ. Budějovice. Translokiĝinte en 1970 al Ústí n. L. mi komencis aktivi kiel E-a kantisto kaj deklamisto lige kun E-poeto kaj kantpoezia tradukisto Jiří Kořínek kaj lia bofilo, E-a publicisto Vlastimil Novobilský. En la jaro 1971 mi kante partoprenis UK de UEA en Londono, en 1973 en Beogrado, poste kiam E-o fariĝis (ĉe ni post fera kurteno) „danĝera lingvo“, mi sukcesis kiel kantisto elvojaĝi nur al UK-oj en Varna (1978) kaj Rotterdam (1988) kaj post la falo de fera kurteno al Vieno (1992). Fine en nia UK en Prago (1996). Krome mi kantis kaj deklamis dum pluraj fakaj kongresoj (SAT, IKUE, KELI, IFEF) kaj kelkaj naciaj kongresoj.

3. Vi organizis internaciajn kulturajn festivalojn

Translokiĝinte en 1970 al Ústí n. L. mi vizitadis E-klubon en la Domo de Kulturo, kiun gvidis s-ano Jiří Kořínek. Mi komencis kanti liajn esperantigojn de famaj kantoj (ekz jam en 1971 dum Londona UK Bibliajn Kantojn de Dvořák). Sekve naskiĝis ideo organizi en

Ústí n. L. E-ajn kulturajn festivalojn. Ili origine okazadis ĉirkaŭ la datoj 1-a kaj 2-a de oktobro, omaĝe al la naskiĝ-datreveno de ambaŭ elstaraj E-aj poezi-tradukistoj J. Kořínek kaj Tomáš Pumpr.

Nur dum ĉi jardeko pro kolizioj kun aliaj aranĝoj la festivaloj okazadis fine de novembro aŭ komence de decembro. Firma parto de ili fariĝis spiritaj koncertoj en E-o en la ĉeĥoslovaka-husana preĝejo. Ili okazadis kun devizo "Toleremo inter religioj" aŭ iam "Bosnio avertas: Religioj ne disigu la naciojn" - ili konsistis ne nur el famaj spiritaj kantoj de religioj kristanaj, sed ankaŭ el motivoj hebrea, islamaj, eĉ paganaj!

La moto de ĉiu tiu programo estis la citaĵo el Zamenhofa Preĝo "Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj – ni ĉiuj de Di' estas filoj!" Per tiu ĉi instigo al religia toleremo fariĝis ĉi koncertoj kaj festivaloj mem unikaĵo ne nur en nia lando.



Smyčka nun kaj antaŭ 20 jaroj en Lančov

(fino en la sekva paĝo)

Linhart Rýznar

(1921 - 2009)



La 9-an de junio 2009 forpasis honora membro de ĈEA, „magiisto“ Linhart Rýznar. Li naskiĝis la 5-an de novembro 1921 en la moravia Šternberk. Li estis unusola filo de patro Leonard, muelisto, kaj patrino Anna, dommastrino. La familio ofte transloĝiĝis. La fundamentan lernejon, kiun li tre malamis, li vizitis en Čejč, la fakan muelistan lernejon en Pardubice.

Por Kristnasko 1936 kiel 15-jarulo li ricevis ĉapelon kaj lernolibron de Esperanto, kiun li eklernis kaj ekamis. Parton de la dua mondmilito li travivis kiel ne bonvola laboristo dum devigaj laboroj en Vöcklabruck, Aŭstrio. Li okupiĝis kiel muelisto, poste estro de gren-silo en agrikultura kooperativo. Post la milito la familio transloĝiĝis al Svitavy, kie la juna Linhart fondis sian familion (filino Leonarda kaj filo Jan) kaj ankaŭ Esperanto-rondeton, kies unua estro li estis. Post kelka tempo li helpis fondi la E-rondeton ankaŭ en la proksima Polička. Li estis iniciatinto de komunaj kunvenoj de proksimaj E-rondetoj – Svitavy, Litomyšl, Polička kaj Česká Třebová. La esperantistoj de tiuj rondetoj kunvenadis dimanĉe, unufoje monate, ĉiam en alia urbo. Oni

preparis distran, amuzan programon.

En 1951 sinjoro Rýznar ricevis aprobon instrui Esperanton, kion li praktikis en someraj kursoj kaj tendaroj en Ĉeĥoslovakio kaj ankaŭ eksterlande per Ĉemetodo (Hungario, Pollando, Germanio).

Post fondiĝo de ĈEA en 1969 li plenumis diversajn funkciojn, en la komitato kaj kontrola komisiono, dudekon da jaroj li tre zorge kaj modele plenumis funkcion de ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio. Li ofte vojaĝis, informis pri ĉeĥa E-movado kaj multfoje ankaŭ kontribuis al artaj kaj distraj programoj en E-renkontiĝoj kiel magiisto. Apud Esperanto li havis multajn hobiojn – vojaĝado, historio, muziko, bildoj de malnovaj majstroj k.s.

Li trifoje edziĝis, lastan fojon al germana esperantistino, kun kiu li vivis en kontenta, feliĉa rilato en la germana Sallgast, kie li ankaŭ mortis en sia 87-a jaro.

Lastan fojon ni renkontis lin en la asocia konferenco en Polička antaŭ du jaroj, tiam li estis jam tre malsana.

Leonarda Chaloupková

(fino de la intervjuo kun M. Smyčka)

Plie mi aktivis ĉe alia internacia aranĝo, lanĉita antaŭ 20 jaroj en la tiama GDR – nome ĉe „ĉeĥa-saksa tago“ – okazinta alterne en najbara Saksio aŭ ĉe ni. En Ústí ĝi konsistis regule el prelega matineo kaj el bunta kultura programo.

En la E-klubo de Jiří Kořínek en Ústí n. L. mi dum pluraj jaroj funkciis kiel klubestro, dum kelkaj jaroj mi gvidis kurson kaj ĉe mia adiaŭo en 2004 mi ricevis titolon de „honora prezidanto“.

Intervjuis Petro Chrdle

BABYLONFEST

festivalo de la kosmopolita urbo
Brno

La 18a – 20a de junio 2009

La festivalan programon prezentis ensembloj ĉeĥaj, pola, ukraina, hungara, bulgara, rusa, israela, jemenaj, japana, brazila, hinda. En la akompana programo (2009-06-18) okazis poezia programo de rusa poetino Ljubov Vondroušková, prezidantino de „Rusa kultura-kleriga societo en Moravio“. Ŝi estas aŭtorino de jam la dua poemkolekto, kiu aperis paralele ruslingve kaj esperante. Post la kolekto „Mia ŝato“ ĵus aperis la dua kolekto „Labirinto“, denove kun la esperanta traduko far Jaroslav Krolupper, en la solenaĵo partoprenanta. „Labirinto“ estis en la programo sole „baptita“. Post kantaj-muzikaj programeroj la aŭtorino Vondroušková prezentis kelkajn poemojn en la rusa lingvo kaj Margit Turková en Esperanto.

Aŭspicie partoprenis reprezentantino de la urba magistrato. La publikan aranĝon en la Biblioteko Mahen partoprenis ĉirkaŭ kvindek homoj, inter ili dudeko da esperantistoj. Oficiala kunaranĝanto estis la „Societo por la internacia lingvo Esperanto“ en Brno, ties prezidanto, Jan Werner, do alparolis la publikon pri la rolo de Esperanto en la multlingva socio kaj kulturo.

we

Ljubov Vondroušková

Fine alvenis, je la 18-a de junio, la tago, kiam esperantistoj eksciis, ke Josef Vondroušek ne estas la unusola famulo de tia nomo, pri kiu BRNO (kaj „ĉirkaŭ“) povas „fieri“.

Ĝuste en la ĉirkaŭ – nome en la vilaĝo Mokrá – vivas Ljubov VONDROUŠKOVÁ. Ŝia nomo jam iel destinas ŝian rolon en tiu ĉi regiono. Rusino, kiu antaŭ jaroj „sekvis sian amon“ (al ĉeĥo), fariĝis forta kaj fama „fenomeno“ de reciproka trapenetrado de ĉeĥa kaj rusa kulturoj. Kaj de la supre skribita datumo ni povas plenvole kaj prave diri: rusa – ĉeĥa – esperanta...



La menciita kunligo „ne falis de la ĉielo,“ sed estas rezulto de la antaŭ-unujara evento, kiun ni devas iom priskribi por komprenigi ĝin al la STARTOgelegantoj.

Tiam pragaj esperantistoj partoprenis solenan vesperon okaze de la 85-jariĝo de la poetino Zdenka Bergrová (certe konate, ke esperantistoj meritas pri traduko de kelkaj ŝiaj verkoj).

Ŝi – mem fama tradukantino de rusa poezio, estis omaĝita pere de rusaj poetoj, kiuj vivas en nia respubliko. Inter ili ankaŭ per nia Ljubov V. Vivas en ni amo al la rusa lingvo (malgraŭ...).

Kiam Jaroslav Krolupper aŭdis ŝian poezion (en ŝia deklamo), li tuj „ekemis“ ĝin traduki – kompreneble en Esperanton.

Nun vi, karaj legantoj, eksciis genezon de la evento, pri kiu estas nia artikolo. Klare dirite: por la 18-a de junio ni organizis kunvenon de rusistoj, kies komunumo troviĝas en Moravio (ili estas ne nur rusoj, sed ankaŭ aliaj nacioj – inter ili multaj „moravianoj“ – ŝatantoj de la rusa kulturo) – kaj esperantistoj. Ni nomu la eventon „poezia“ – ĉar ĝuste poezio estis kerno de la programo. La poezio, kiu omaĝis la poetinon Ljubov Vondroušková, ŝia poezio, deklamita de la aŭtorino; kaj en esperanta traduko de J. Krolupper.

Ni ĝuis ĉiuj. Jaroslav ne rezistis je „la belega rusa lingvo“ kaj tuj kun Ljubov pritraktis traduki ŝian pluan verketon. Do, ni povas antaŭĝoji por legi jam la trian volumeton. Laŭ posta eldiro de Ljubov, la ĝuon havis ankaŭ la ne-esperantista aŭskultantaro. Ilin alparolis Jan Werner per trafa klarigo, kio estas Esperanto, kiajn celojn ĝi havas. Laŭ postesprimo de Ljubov ŝiaj ge-rusistoj estis „agrable surprizitaj“, ke ekzistas tia pozitiva fenomeno; pri kiu ili eĉ ne aŭdis antaŭe. Ni opiniu tiun ĉi okazon grava jam pro la fakto, ke ĝin partoprenis PhDr. Jaroslav Novák – la prezidanto de „Obec moravských spisovatelů“ (branĉo de la tutŝtata „Komunumo de verkistoj“). Per sia ĉeesto li honorigis la aŭtorinon, kiu, unusola rusa verkistino, estas membro de ĉi Komunumo.

Pri la lingvo Esperanto, ties utileco, eble plej efike konvinkis ĉiujn rezulto en la formo de kelkaj poezi-verketoj, kiujn ni donacis al la ĉeestantoj. Ni listigu ilin:

Mia ŝato (Ljubov Vondroušková / rusa-esperanta)

Labirinto (Ljubov Vondroušková / rusa-esperanta)

Aŭtuna luno (Zdenka Bergrová / ĉeĥa-esperanta)


Kun pilgrimbastono (Čestmír Vidman / ĉeĥa-esperanta)

Dek sep silaboj (Čestmír Vidman / ĉeĥa-esperanta)

(ni nur substreku, ke ĉiujn esperantigis Jar. Krolupper)

Vere dirite, ke pro la kolekto estis plej efike „trafita“ la sinjorino Vondroušková, kion klare demonstras ŝia deziro: „Mi esperas, ke ni ankoraŭ organizos similan renkontiĝon – nun kun partopreno ankaŭ de la ĉeĥa poezia lingvo.“ Ĉu tio ne estas ankaŭ nia „dezirego“?

Por *STARTO* skribis M. Turková,
20.6.09



Bazo por diskuti esperantajn terminojn por amaskomunikiloj

Laŭ la Ĉeĥa-esperanta vortaro de Karel Kraft (1998) amaskomunikiloj signifas „hromadné sdělovací prostředky“. Sed la vortaro ne enhavas la vortojn „masmédia“ resp. „média“, kiuj estas nuntempe en la ĉeĥa lingvo tre ofte uzataj. Estas evidente, ke en la lastaj jaroj la evoluo de „fluo de informoj“, informadiko, estas tre rapida. Estas necese ĝin sekvi ankaŭ en la esperanta faka leksiko.

La formo amaskomunikilo estas tro ĝenerala kaj malfacile difinebla nomindiko, kiu apenaŭ konvenas por derivi la specojn: magnetaj, optikaj, grafikaj, storaj amaskomunikiloj. Ĝi ne estas internacia. El la vidpunkto de vaste uzata eŭropeca radiko medi' por la koncerna nocio, amaskomunikilo ŝajnas nekonvena por faka uzado.

Amaskomunikilo laŭ NPIV estas ankaŭ **mediato**, sed pro ĝia neatendita apero en NPIV (en presitaj dokumentoj mi ĝis nun neniam ĝin renkontis), pro ĝia neklara motiviteco, ĝi estas suspektinda kaj mia konscienco admonas min ne uzi ĝin. La radiko medi' estas klara, sed kion en ĝi signifas la participa pasiva sufikso -at/, kiu en nacilingvaj versioj ne aperas?

Koncerne la mediaton mi demandis W. Blanke (Berlino). Ŝia respondo tekstas jene: „Koncerne "mediato" mi duoble substrekus vian demandosignon. En via mesaĝo mi renkontis ĝin unuan fojon kaj NPIV bedaŭrinde donas nek fonton, nek kuntekstan ekzemplon. Mi ne imagas, kiam kaj de kie ĝi venis en Esperanton.“

Mi kuraĝas lanĉi proponon de alia nomindiko, kiu prezentas perilon en speciala fako. Amaskomunikiloj ja estas ankaŭ periloj, jes, periloj de informoj inter elsendanto kaj anonima akceptanto – homamaso. Tiu nomindiko estas „**mediumo**“ – pera faktoro, perilo. Diference de tro multaj homonimofoboj en la movado, mi konsideras troan fobion kontraŭ homonimoj superflua kaj en nia longjara praktiko eĉ danĝera, ĉar ĝi kondukas al netolereblaj misvojiĝoj disde internaciaj formoj kaj al netolerebla malakordo de etimologie kaj semantike parencaj formoj (ekz. planedo x planetario k.a.). Jen provo pri difino kaj ekspliko de du signifoj de mediumo:

Mediumo – **1** (*okultismo*) persono peranta (kutime en transo) kontakton kun mortintoj aŭ kun distancaj personoj, event. kun aliaj spiritaj medioj.

Mediumo – 2 (*sociologio, informadiko*) pera rimedo de amasa komunikado – amaskomunikilo.

(Amas)mediumoj portas informojn kaj mesaĝojn al anonima amaso de akceptantoj en granda nombro de identaj kopioj (en la formo de presaĵoj, signalo, magnetaj kopioj, filmkopioj, flugfolioj, afiŝoj k.s.). Mediumoj estas rimedoj de vastigado de amaskulturo. Mediumoj ebligas rapidan disvastigon de informoj, helpas malpliigi diferencojn inter urbo kaj kamparo, inter klera „elito“ kaj homamaso. Aliflanke mediumojn estas eble konsideri kiel ilon de ĝenerala manipulado kaj kaŭzo de malseriozigo kaj senvalorigo de homaj ideoj kaj konceptoj, kiel vastiganton de konsumata pensmaniero kaj vivstilo. Ili partoprenas grave, ofte eĉ decide en la evoluo de t.n. amasa socio.

Mi kuraĝas progresi ankoraŭ pli kaj observas enhavon de la nocio „**medio**“ – laŭ la eksplikoj en la nova PIV: **1** La materia spaco, ĉirkaŭaĵo..., **2** Tuto de la sociaj cirkonstancoj kaj rilatoj..., **3** La tuto de la senvivaj kaj vivaj faktoroj en la ĉirkaŭaĵo... Ĉiam temas pri nelimita spaco, en kiu oni troviĝas, agadas, al kiu oni iel efikas. Nuntempe nian homan medion grave invadas ĉiuspecaj informoj, eblas do aserti, ke **medioj** estas ankaŭ: **4** Tuto de informaj faktoroj kaj rilatoj inter ili kaj celata homamaso; en plurala formo, ĉar la tuton formas pluraj specoj, precipe: magnetaj, optikaj, grafikaj kaj storaj.

cs: média	de: Medien	en: media	fr: supports	eo: medi(um)oj
pásková média	Band-Medien	tape media	supports magnétiques	magnetaj medi(um)oj
optická média	optische Medien	optical media	supports optiques	optikaj medi(um)oj
tisková média	Druck-Medien	print media	supports graphiques	grafikaj medi(um)oj
záznamová média	Speicher-Medien	storage media	supports de stockage	storaj medi(um)oj

Pri via opinio bonvolu informi:

Jan Werner, Dřínová 18, CZ-61200 Brno; wernerjan@seznam.cz

Brno 2006-01-30 kaj 2006-02-01

Reagoj:

Mgr. Zdeněk Hršel esprimis sian opinion: „medio“ sufiĉas, („-ato“ nur en NPIV), „mediumo“ tamen pli konvena. – 2006-02-08

Komento al la reagoj pri „Ni legis kaj korektis“

Mian kritikon en Starto 1/2009, p. 27-28, sekvas la redakcia rezono, en kiu M. Malovec defendas la montritajn erarojn per referencoj al aliaj eraraj aplikoj. Valoro de liaj argumentoj estas do preskaŭ nula. Persvadi la legantojn al misuzado de la prepozicio „dum“ en nedaŭraj okazoj, de la ĝenerala substantivo „fluo“ en la senco kurento, de la vorto „personeco“ por nomi personon (ekz. fraton), tio estas danĝera malstabiliga eksperimentado en planlingvo netolerebla. Spontana evoluo ja karakterizas naciajn lingvojn.

Bedaŭrinda estas lia konsidero de la esprimo „dank’ al“ kiel „klasika frazeologiaĵo“. Kvankam ĝi vere estas „frazologiaĵo“, li ne povas refuti, ke ĝi estas kontraŭfundamenta. Ne rajtas ĝin aprobi eĉ la Akademio. Tamen tre multaj „fidelaj samideanoj“ uzas ĝin ridinde ŝparante nur la literon „e“, kiu devas en la frazeologiaĵo aperi: „danke al“.

Ankoraŭ pri malpravo de M. Malovec (Starto 1/2009) kaj M. Turková (Starto 2/2009) konvenas referi: Ambaŭ asertis, ke la vorto „personulo“ estas en neniuj vortaro. En la n-ro 2/2009 Malovec jam agnoskis, ke ĝi estas en la vortaroj de Minnaja (1996) kaj Krause

(1999). Sed strange estas, ke ili ne scias, ke „personulo“ estas en Plena Ilustrita Vortaro (PIV, 1970) de Gaston Waringhien, kiu vere superas la „stelon“ de PIV-reviiziinto Goninaz. Tie oni povas legi: „**Personulo** – persono fame konata pro siaj funkcioj, verkoj ktp.: *Zamenhof estis celebrata 1959 kiel unu el la grandaj personuloj de la homaro.*“ – Do vidu, Zamenhof estas personulo! Prave, li nepre ne povas esti „personeco“, kvankam pluraj, inkluzive de la redaktoro de Starto, pri tio insistas.

Jan Werner – 2009-06-20

Rimarkigo de la redaktoro: En la menciita PIV (1970) oni trovas ankaŭ: *dank’ al Dio, dank’ al supre montritaj reguloj; dum la vojo Klaro parolis al Marta; dum ili estis irantaj kaj parolantaj, subite aperis fajra ĉaro.*

Kiam ni kontrolas Starton, ni ne povas konsideri kiel eraron, kio havas apogon en vortaroj kaj gravaj literaturaj verkoj. Imagu, ke milionoj da novuloj vere lernus Esperanton kaj la malnovaj esperantistoj komencus ilin persekuti, ke ili ne rajtas uzi, kion ili trovas en siaj vortaroj. Kaj ĉiu persekutanto asertus ion alian, laŭ sia persona konvinko. Korĵenkov en siaj tradukoj de Dostojevskij uzas *dank’ al*, Pokrovskij rifuzas *personulon* kiel fuŝvorton, Corsetti kondamnas ambaŭ esprimojn.

La oficiala rezolucio el Bjalistoko (p. 67) ĝuste devus teksti: ... *Unesko rekonis lian personecon kiel unu el grandaj personecoj* ... Sed ĉu ni rajtas korekti oficialan dokumenton?

POŝTUPE

Sen „falsa modesteco“ oni povas diri, ke Esperanto poŝtupe fariĝas partoprenanto de kelkaj literaturaj entreprenoj.

La lasta (la 2-an de junio 2009) okazis omaĝe al neĝisvivita 86-jariĝo de la poetino **Zdenka Bergrová**. La favorantojn kaj amikojn invitis ŝia edzo kaj ilustranto de ŝiaj verkoj **Věroslav Bergr**. Ni jam skribis, ke li estas neevitebla kunaŭtoro, do la ambaŭ nomoj meritas esti skribitaj unu apud la alia. La evento okazis en grava institucio – ne necesas klarigi, kio estas PAMÁTNÍK NÁRODNÍHO PÍSEMNICTVÍ (La Muzeo de la Nacia Literaturo), en Prago, Strahov. Sed por ni esperantistoj estas tre ĝojiga la fakto, ke same **Jaroslav Krolupper** estas „neevitebla kunaŭtoro“.



En la historiaj spacoj ni omaĝis ankaŭ la libron de poeziaĵoj, kiu havas la titolon „*Podzimní měsíc – Aŭtuna luno*“. Por karakterizi la versaĵojn, ni citu la postparolon fare de J. Krolupper: „*La prezentitaj versaĵoj de Zdenka Bergrová, inspiritaj de ĉina poezio, estas verŝajne*

ankaŭ ŝia implice eldirita kredo-deklaro de la poeto. Ne nur tiuj, sed ĉiuj ŝiaj versaĵoj estas ja impresaj emociaj bildoj, esprimantaj sentojn de la homo en diversaj gravaj kaj eĉ petolaj situacioj.“

Post kiam ni plene ĝuis kaj deklamadon kaj muzikan akompanon, ni salutis la aktorojn. Al Alfred Strejček estis enmanigita la *BULTENO* (li estas jam delonga ricevanto de ĝi, danke al Jiří Patera). Kiam ni liveris la poemlibrojn de Čestmír Vidman kaj Zdenka Bergrová al la aktorino Tatjana Medvecká, ŝi ĝoje eldiris: „Fine mi vidas iun vivan esperantiston“. Kaj ni estis tri (Krolupper, Patera, Turková). Ni estis eĉ kvar! Ĉar la sinjorinon **Věra Ludíková** oni povas „alproprigi“ pro ŝia daŭra favorado al Esperanto. Ni estu dankemaj, ke ankaŭ okaze de la menciita evento ŝi montris ĝin – ne nur inter ni – sed ankaŭ antaŭ la partoprenantaj reporteraj. Ŝi plene komprenis, kia peranto inter kulturoj povas esti Esperanto.

Kun deziro, ke ankaŭ esperantistoj tion komprenu, mi skribas jenan raporton.

*En Prago, 3.6.09
Margit Turková*

ESTAS AŬTUNO ...

Ĉe akvo staras nuboj kolorita,
mallumo en ĝin jam englitas.
De pontoj ĉielarko
navigas sur lago kiel barko.
Koloroj aŭtune sangas.
Super domaĉoj
blanka laĉo
de fumo tangas.

KALENDARO

2009-10-09/11 Konferenco de ĈEA en Svitavy

2009-10-12/18 InPaSem, Dobřichovice

2009-11-06/08 Terminologia seminario Dobřichovice - NULIGITA!!!

2009-12-12 Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek

2010-09-09/11 Simpozio okaze de 50-jariĝo de Esperanto-Klubo en Česká Třebová

Ni kondolencas



- la 3-an de junio 2009 forpasis Josef Flídr el Litomyšl, prezidanto de la loka klubo, membro de la ĉeĥa IKUE-sekcio. Li estis entombigita en sia naskiĝvilaĝo Lezník.

PROpono DE UEA PRI ESPERANTO AL KVAR MONDAJ GVIDANTOJ

La 16-an de junio 2009 okazis en la rusa urbo Jekaterinburgo la unua pintkunveno de Brazilo, Rusio, Hinda Unio kaj Ĉinio. Tiuj kvar landoj intencas kunlabori pli intense kaj elpaŝi kune en la monda politiko. En Jekaterinburgo, kie la ĉefa temo estis la nuna ekonomia krizo de la mondo, renkontiĝis la ŝtatestroj Dmitrij Medvedev el Rusio, Luiz Inacio Lula da Silva el Brazilo kaj Hu Jintao el Ĉinio, kaj la barata ĉefministro Manmohan Singh.

Post la kunveno la prezidanto de UEA, prof. Probal Dasgupta, skribis al la kvar gvidantoj, karakterizante la eventon kiel historian.

"Ekonomia krizo okazigita alilande

trafas viajn landojn grave, ne nur pro la nekredblaj riskoj kaj ŝuldoj alprenitaj en Usono, sed ankaŭ pro la fakto, ke la valuto de nur unu lando rolas kiel internacia valuto", li komentis la temon de la kunveno. Per tio li samtempe enkondukis proponon:

"Universala Esperanto-Asocio proponas al vi la ideon, ke valutoj kaj lingvoj funkcias sammaniere. La internacia uzo de la angla plifortigas nur kelkajn privilegiitajn landojn kaj samtempe starigas riskojn kaj kostojn por ĉiuj aliaj. Ĉu tiaj privilegioj, valutaj kaj lingvaj, kondukis nin al pli bona mondo? Ĉu la kostoj estis efikaj? Certe ne."

"Viaj kvar landoj estas promesaj landoj por la estonteco. Sed vi, kiel ni tra la tuta mondo, devas ĉesigi la valutajn kaj lingvajn privilegiojn, se ni volas progresi rapide, malpli koste kaj harmonie. Pri nova valuta sistemo, vi jam havas ideojn kaj proponojn. Por nova lingva sistemo, ni proponas Esperanton kiel efikan, pragmatan kaj malpli kostan solvon."

La letero de prof. Dasgupta estis sendita al ĉiu ricevanto en ties propra lingvo.

Laŭ Gazetara komuniko de UEA

Malvarma Milito

Mi nun verkas artikolon pri la "Malvarma Milito" inter Usono kaj Sovetunio. Mi interesiĝas pri kiel diversaj Eŭropaj eduksistemoj traktis la finon de la Dua Mondmilito kaj kiel populara opinio en diversaj landoj traktas la kulpon rilate la malamikecon inter la du Super-Reĝimoj dum la jardekoj post la Mondmilito. Ĉu vi povus sciigi min (nur skize) pri via lando?

Miko Sloper

mikosloper@gmail.com

Jak platit svazu

V kterékoliv pobočce Poštovní spořitelny a ve většině poboček České pošty si vyžádáte **tiskopis VKLAD**, který vyplníte ve všech kolonkách: **částka Kč** - sumu, kterou platíte, **č. účtu**: 195 230 825/0300, **variabilní symbol**: má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Další pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete L. Hýblové seznam, za koho platíte. **Konstantní symbol** je 0379 a **název účtu** je: Český esperantský svaz. Stejná čísla uveďte na ústřížek, který slouží jako doklad o platbě. Platba je bez poplatku.

Seznam čísel (variabilní symboly):

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50200** sekce železničářů IFEF
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 86-7290070227/0100
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio

Upozornění

pro sekce, kluby a kroužky ČES

Občanská sdružení jsou podle vyhl. 634/2004 Sb. osvobozena od placení poplatků za ověření listiny - t.j. položka 4 - a za ověření podpisu - t.j. položka 5.

Zájemci o časopisy

POZOR na změnu bankovního účtu!

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz. Předplatné uhradte na účet u Poštovní spořitelny v Poděbradech, č. ú. 231 798 902/ 0300, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 990,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 590,-Kč

La Gazeto: 600,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

La Ondo de Esperanto: 560,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4, reta versio 340,- Kč.

Juna Amiko: 260,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 32 stran formátu A5

Literatura Foiro: 1010,- Kč (*670,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5

Heroldo de Esperanto: 1090,- Kč (*730,- Kč), v.s. 07006, 17 čísel ročně, 4 strany formátu A 3

Femina: 670,- Kč (*450,- Kč), v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A4

Litova Stelo: 290,- Kč, v.s. 07008, 6 čísel ročně, 36 stran formátu A5

*označená cena v závorce platí pro předplatitele mající esperantské občanství (v organizaci „Esperanta civito“)

Periodikum Ĉeského esperantského svazu - 40. ročník

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

malovec@volny.cz

<http://members.chello.cz/malovec/>

Předplatné v Ĉesku (bez členství ve svazu): 200 Kč

Ĉlenská evidence a změny adres:

**p/a Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789
62 Olšany, libusehyblova@seznam.cz,
tel. 774 928 974**

Uzávěrka příštího čísla: 15.11.2009

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio -
- 40-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj
aŭ rekte ĉe nia Asocio**

Abonprezo: 10 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

**Redakto: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

Ĉeĥio, malovec@volny.cz

<http://members.chello.cz/malovec/>

Presis: DTP centrum, Svitavy

**Redakto-fermo de la sekva numero:
15.11.2009**

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

ilojn (fakvortaretojn, ekzercarojn ktp.). La ĉefa aktuala grupeto okupiĝos pri ĉiĉeronaj aŭ ĝenerale turismaj tekstoj, sed tradukantoj de beletro kaj aliaj fakaj tekstoj estas same bonvenaj! Sukceso de la grupo dependos de aktiveco de ĉiuj el ĝiaj membroj. Membreco en ĈEA ne estas kondiĉo. Portempa kunordiganto estas Pavla Dvořáková el Písek. Interesiĝantoj bv. anonciĝi ĉe traduko@esperanto.cz

TRADUKGRUPO FONDITA

Dum la aranĝo en Netolice estis fondita sekcio (laborgrupo) por E-tradukantoj, celanta kunordigi tradukprojektojn, reciproke subteni sin per konsultiĝoj kaj lingvorevizioj, krei komune lingvohelp-